

Singardu de Fiero

Ezra Taft Benson

Prezidanto de la Eklezio de Jesuo Kristo de la Sanktuloj de la Lastaj Tagoj, Aprilo 1989

Miaj amataj fratoj kaj fratinoj, mi ĝojas esti kun vi en alia glora ĝenerala konferenco de la Eklezio. Kiel dankema mi estas por la amo, preĝoj, kaj bonservoj de la sindonaj anoj de la eklezio tra la tuta mondo.

Mi laŭdas vin, fidelaj Sanktuloj, kiuj strebas por inundi la teron kaj viajn vivojn kun la Libro de Mormon. Ne nur ni devas antaŭenirigi monumente pli kopiojn de la Libro de Mormon, sed ni ankaŭ devas kuraĝe antaŭenirigi pliajn de ĝiaj mirindaj mesaĝoj en niajn proprajn vivojn kaj tra la tuta tero.

Tiu sankta volumo estis skribita por ni kaj por nia tago. Ĝiaj skribmesaĝoj devas konektiĝi al niaj vivoj. (Vidu 1 Ne. 19:23.)

La Doktrino kaj Interligoj diras al ni ke la Libro de Mormon estas la "raporto de falinta popolo." (D&I 20:9.) Kial ili falis? Tio ĉi estas unu el la ĉefaj mesaĝoj de la Libro de Mormon. Mormon, la profeto, donas la respondon en la finiĝantaj ĉapitroj de la libro en jenaj vortoj: "Jen, la fiero de ĉi tiu nacio, aŭ la popolo de la Nifaiidoj, estas pruvita fari ilian pereon." (Moro. 8:27.) Kaj do, por ke al ni ne mankas tiu memorinda mesaĝo en la Libro de Mormon de tiu falinta popolo, la Sinjoro avertas nin en la Doktrino kaj Interligoj jene, "Singardu de fiero, tiel vi ne fariĝu kiel la Nifaiidoj de antikveco." (D&I 38:39.)

Mi fervore serĉas intereson pri via fido kaj preĝoj dum mi strebas naski lumon sur tiu mesaĝo de la Libro de Mormon - tio estas, la peko de fiero. Ĉi tiu mesaĝo tre pezis sur mia animo por iu tempo. Mi scias, ke la Sinjoro volas ke ĉi tiu mesaĝo estu eldirata nun.

En la antaŭmortema konsilio, fiero estis tio, kio faligis Luciferon, "filo de la mateno." (2 Ne. 24:12-15; vidu ankaŭ D&I 76:25-27; Moseo 4:3.) Je la fino de tiu ĉi mondo, kiam Dio purigos la teron per fajro, fieruloj estos bruligitaj kiel stoplo kaj la humiluloj heredos la teron. (Vidu 3 Ne. 12:5, 3 Ne. 25:1; D&I 29:9; JS-H 1:37; Mal. 4:1.)

Trifoje en la Doktrino kaj Interligoj la Sinjoro uzas la frazon "Singardu de fiero," inkluzive averton al la dua aĝulo de la Eklezio, Oliver Cowdery, kaj al Emma Smith, la edzino de la profeto. (D&I 23:1; vidu ankaŭ D&I 25:14 D&I 38:39.)

Fiero estas tre miskomprenita peko, kaj multaj pekas nescie. (Vidu Mosiah 3:11; 3 Ne. 6:18.) En la skriboj ne ekzistas afero nomita justa fiero - oni ĉiam konsideris ĝin peko. Tial, kiom ajn la mondo uzas la vorton, ni devas kompreni kiel Dio uzas la vorton do ni povas kompreni la lingvon de sankta skribo kaj profitas per ĝi. (Vidu 2 Ne. 4:15; Mosiah 1:3-7; Alma 5:61.)

La plejmulto el ni pripensas fieron kiel memcentrigo, malmodesteco, memlaŭdo, aroganteco, aŭ malhumileco. Ĉiuj de tiuj estas eroj de ĉi tiu peko, sed la koro, aŭ kerno, ankoraŭ mankas.

La centra trajto de fiero estas malamikeco - malamikeco rilate al Dio kaj malamikeco al niaj kunhomoj. Malamikeco signifas "malamon aŭ kontraŭecon al, aŭ staton de opozicio." Ĝi estas la potenco, per kiu Satano deziras reĝi super ni.

Fiero estas esence konkura en ĝia naturo. Ni starigas nian volon kontraŭ volo de Dio. Kiam ni direktu nian fieron al Dio, ĝi estas en la spirito de "mia volo, kaj ne via, estu farenda." Kiel Paŭlo diris, ili "celas siajn aferojn, ne la aferojn de Jesuo Kristo." (Philip. 2:21.)

Nia volo en konkurado al la Dia volo lasas niajn dezirojn, apetitojn kaj pasiojn esti senbridaj. (Vidu Alma 38:12, 3 Ne. 12:30.)

La fieraj ne povas akcepti la aŭtoritaton de Dio por doni direkton al liaj vivoj. (Vidu Hel. 12:6.) Ili starigas siajn kapablecojn kontraŭ la Dian pastran potencon, siajn perceptojn de la vero kontraŭ la granda scio de Dio, kaj siajn atingojn kontraŭ Liaj ĉionpovaj faritaĵoj.

Nia malamikeco al Dio transprenas multajn etikadojn, kiel ribelo, malmolkoreco, rigidnukeco, nepentanta, supersatigita, facile ofendita, kaj signo-serĉantoj. Fieraj homoj deziras ke Dio konsentus kun ili. Ili ne interesiĝas pri ŝanĝo de siajn opiniojn por interkonsenti kun Dio.

Alia grava parto de tiu tre disvastiĝinta peko de fiero estas malamikeco al niaj kunhomoj. Ni estas tentataj ĉiutage levi nin mem super aliaj kaj etigi ilin. (Vidu Hel. 6:17; D&I 58:41.)

Fieruloj faras ĉiun personon sia kontraŭulo per starigante siajn intelektojn, opiniojn, faritaĵojn, riĉecon, talentojn, aŭ iujn ajn aliajn mondumajn mezurilojn kontraŭ aliuloj. En la vortoj de CS Lewis: "Fiero ne atingas plezurojn de havi ion, sed nur havante pli da ĝi, ol alia homo. ... Ĝi estas la komparo, kiu farigas personon fiera: la plezuro esti super la ceteraj. Kiam la elemento de konkurenco malaperas, tiam fiereco malaperas." (Nura Kristanismo, Nov-Jorko: Macmillan, 1952, po 109-10.)

En la antaŭ-surtera konsilo, Lucifero metis sian proponon en konkurado kun la plano de la Patro kiel proponita de Jesuo Kristo. (Vidu Moseon 4:1-3.) Li deziris ke oni honoris lin super ĉiuj aliaj. (Vidu 2 Ne. 24:13.) Mallonge, lia fiera deziro estis detronigi Dion. (Vidu D&I 29:36 D&I 76:28.)

La skriboj abundas kun evidentecoj de la severaj konsekvencoj de la peko de fiero por individuoj, grupoj, urboj kaj nacioj. "Fiero iras antaŭ la pereco." (Prov. 16:18.) Ĝi detruis la Nifaiidan nacion kaj la urbon de Sodomo. (Vidu Moro. 8:27; Ezek. 16:49-50.)

Estis per fiero, ke Kristo estis krucumita. La Fariseoj ekkoleris ke Jesuo asertis esti la Filo de Dio, kio estis minaco al ilia pozicio, kaj tial ili komplotigis Lian morton. (Vidu Johanon

11:53.)

Saul fariĝis malamiko al David per fiero. Li ĵaluzis ĉar la amasoj de Izraelidaj virinoj kantis, ke "Saul frapis milojn, kaj David dekmilojn." (1 Sam. 18:6-8.)

La fieruloj estas pli timigitaj de homaj juĝoj, ol de la Dia juĝo. (Vidu D&I 3:6-7; D&I 30:1-2; D&I 60:2.) "Kion homoj pensos pri mi?" pli pezas ol "Kion Dio pensos pri mi?"

Reĝo Noa estis ekliberigonta la profeton Abinadin, sed alvoko al sia fiero de siaj malbonaj pastroj sendis Abinadion al la flamoj. (Vidu Mosiah 17:11-12.) Herodo malĝojis je la peto de sia edzino, kio estis ke oni senkapigu Johanon, la Baptiston. Sed lia fiera deziro montri sin bone al "tiuj kiuj sidis kun li je manĝaĵo" kaŭzis lin mortigi Johanon. (Matt. 14:9; vidu ankaŭ Mark 6:26.)

Timo de homaj juĝoj manifestiĝas kiam oni konkuras por la aproboj de homoj. La fiera homo amas "la laŭdon de homoj pli, ol la gloron de Dio." (Johano 12:42-43). Niaj motivoj por la aferojn ni faras estas kie la peko manifestiĝas. Jesuo diris, ke Li faris "ĉiam tiujn aferojn" kiuj plaĉis al Dio. (Johano 8:29). Ĉu ni ne farus bone havi la plaĉojn de Dio kiel nia motivo anstataŭ provante levi nin mem super nia frato kaj superi aliulon?

Kelkaj fieraj homoj ne zorgas tiom pri tio, ĉu iliaj salajroj kontentigas siajn bezonojn, kiel ili zorgas, ke iliaj salajroj estu pli ol la (salajroj) de aliuloj. Ilia rekompenco estas esti suprestaranta la ceterajn. Jen la malamikecon de fiero.

Kiam fiero posedas la koron, ni perdas nian sendependecon de mondaj aferoj kaj ni transdonas niajn liberecojn al la sklaveco de homaj juĝoj. Mondaj aferoj kriegas pli laŭte ol la flustroj de la Sankta Spirito. La rezonado de homoj anstataŭigas la revelaciojn de Dio, kaj la fieruloj maltenas la feran vergon. (Vidu 1 Ne. 8:19-28; 1 Ne. 11:25, 1 Ne. 15:23-24.)

Fiero estas peko, kiu estas videbla facile en aliaj sed estas malofte konfesita de ni mem. La plejmulto el ni konsideras fieron esti peko de tiuj sur la supro, kiel la riĉuloj kaj la kleruloj, rigardante malsupren je la resto de ni. (Vidu 2 Ne. 9:42.) Tamen, ekzistas multe pli ofta malsano inter ni - kaj tio estas fiero de malsupre rigardante supren. Ĝi evidentiĝas per tiom da manieroj, kiel ekzemple, kulpo-trovo, klaĉado, mordado reen, grumblado, vivante ekster niaj rimedoj, envio, avidaj agoj, senpardonemo, ĵaluzo, kaj retenado de danko aŭ laŭdo kiu povus altigi la animojn de aliaj.

Malobeo estas esence fiera baraktado de potenco kontraŭ iu, kiu havas aŭtoritaton super ni. Tiu povas esti gepatro, pastreca gvidanto, instruisto, aŭ fine Dio. Fiera persono malamas la fakton, ke iu estas super li. Li pensas ke tio malaltigas lian pozicion.

Egoismo estas unu el la plej oftaj aspektoj de fiereco. "Kiel ĉio efikas al mi" estas la centro de tio, kio gravas - tromemamo, memkompato, monduma mem-plenumo, mem-plezurego, kaj mem-enpoziciigo.

La rezultoj de fiero estas sekretaj pekaj grupaĉoj kiuj estas konstruitaj por akiri povigon, gajnon, kaj gloron de la mondo. (Vidu Hel. 7:5; Eter 8:9, 16, 22-23; Moseon 5:31.) Ĉi tiu frukto de la peko de fiereco, nome sekretaj pekaj grupaĉoj, ruinigis ambaŭ la Ĝaredidan kaj la Nifaiidan civilizaciojn kaj ankoraŭ estos la kaŭza falo de multaj nacioj. (Vidu Eter 8:18-25.)

Alia aspekto de fiero estas kontraŭstaro. Disputoj, luktoj, maljusta regado, generaciaj breĉoj, eksedziĝoj, geedza ofendo, tumultoj, kaj perturboj ĉiuj falas en tiu kategorio de fiereco.

Disputoj en niaj familioj forpelas la Spiriton de la Sinjoro. Ĝi ankaŭ forpelas multajn el niaj familianoj. Disputo etendiĝas inter malamika parolata vorto kaj tutmondaj konfliktoj. La Skriboj diras al ni, ke "nur per fiero venas malpaco." (Prov. 13:10; vidu ankaŭ Prov. 28:25.)

La Skriboj atestas ke fieruloj facile ofendiĝas kaj tenas rankorojn. (Vidu 1 Ne. 16:1-3). Por teni aliulon sub sia komando kaj pravigi siajn vunditajn sentojn, la fieraj rifuzas pardonpeti.

Fieraj homoj ne facile akceptas konsilon aŭ korekton. (Vidu Prov. 15:10, Amos 5:10.) Ili estas defensivaj por kialigi kaj raciigi siajn eraremojn kaj malsukcesojn. (Vidu Matt. 3:9; Johano 6:30-59.)

La fieruloj dependas de la mondo por diri al ili ĉu ili havas valoron aŭ ne. Ilia memestimo determiniĝas per kie oni juĝas ilin esti sur la ŝtupetaroj de monduma sukceso. Ili sentas sin indajn kiel individuoj, se estas sufiĉe granda nombro da personoj sub ili rilate al atingo, talento, beleco, aŭ intelekto. Fiero estas malbela. Ĝi diras, "Se vi sukcesos, mi estas fiasko."

Ni havos memestimon, se ni amas Dion, plenumas Lian volon, kaj timas Lian juĝon pli ol homa.

Fiero estas damnita peko en la vera senco de tiu vorto. Ĝi limigas aŭ haltigas progreson. (Vidu Alma 12:10-11.) La fieraj ne facile instruiĝis. (Vidu 1 Ne. 15:3, 7-11.) Ili ne ŝanĝos siajn opiniojn por akcepti veraĵojn, ĉar fari tion implicus ke ili estis malĝustaj.

Fiero negative efikigas ĉiujn niajn koramikecojn - nian koramikecon kun Dio kaj Liaj servistoj, inter edzo kaj edzino, patro kaj filo, labordonanto kaj laborprenanto, instruisto kaj lernanto, kaj ĉiu homaro. Nia grado de fiero determinas kiel ni traktos nian Dion kaj niajn gefratojn. Kristo volas levi nin kien li estas. Ĉu ni volas fari same por aliaj?

Fiero velkigas niajn sentojn de gefiladopto al Dio kaj frateco al homo. Ĝi disigas kaj dividas nin per "rangoj", laŭ niaj "riĉaĵoj" kaj niaj "ŝancoj por lerni". (3 Ne. 6:12.) Unueco neebblas por fiera popolo, kaj se ni ne estas unuiĝintaj ni ne estas la popoloj de la Sinjoro. (Vidu Mosiah 18:21 D&I 38:27 D&I 105:2-4; Moseo 7:18.)

Pripensu kion fiero kostis al ni en la pasinteco, kaj kion nun ĝi kostas al ni en niaj propraj

vivoj, niaj familioj, kaj la Eklezio.

Pripensu la pentadon kio povus okazi kun vivoj ŝanĝiĝaj, geedzeco saviĝaj, kaj hejmoj fortigitaj, se fiero ne malebligis nin de konfesado de niaj pekoj kaj forlasante ilin. (Vidu D&I 58:43.)

Pensu pri la multaj, kiuj estas malpli aktivaj membroj de la Eklezio, ĉar ili ofendiĝis kaj ilia fiereco ne permesas al ili pardoni aŭ plene manĝi je la tablo de Dio.

Pensu pri la dekmiloj de pluaj junuloj kaj paroj kiuj povus servi je misioj krom tio ke la fiero, kio malebligas ilin cedi iliajn korojn al Dio. (Vidu Alma 10:6; Hel. 3:34-35.)

Pensu kiel templa laboro plimultiĝus, se la pasigita tempo farante ĉi dian servon pli gravus ol la multaj fieraj okupoj kiuj konkurencas por nia tempo.

Fiero tuŝas al ni ĉiujn en diversaj tempoj kaj en diversaj gradoj. Nun vi povas vidi kial la konstruaĵo en la revo de Lihaio, kiu reprezentas la fierecon de la mondo, estis vasta kaj grandspaca kaj grandega estis la homamaso kiu eniris ĝin. (Vidu 1 Ne. 8:26, 33; 1 Ne. 11:35-36.)

Fiero estas la universala peko, la granda malvirto. Jes, fiero estas la universala peko, la granda malvirto.

La antidoto por fiero estas humileco - mildeco, submetiĝo. (Vidu Alma 7:23.) Ĝi estas la rompita koro kaj pentanta spirito. (Vidu 3 Ne. 9:20; 3 Ne. 12:19, D&I 20:37 D&I 59:8; Ps. 34:18; Isa. 57:15; Isa. 66:2.) Kiel Rudyard Kipling metis ĝin tiel bone:

La tumulto kaj la ĝojkriado mortas;
La kapitanoj kaj la reĝoj foriru.
Ankoraŭ staras via antikva ofero,
Humila kaj penta koro.
Sinjoro, Dio Cebaot, estu kun ni ankoraŭ,
Por ke ni ne forgesu, ke ni ne forgesu.
(Himnoj, 1985, ne. 80.)

Dio havos humilan popolon. Aŭ ni povas decidi esti humilaj aŭ ni povas esti devigitaj esti humila. Almao diris: "Feliĉaj estas tiuj, kiuj humiligas sin sen esti devigita esti humilaj." (Alma 32:16.)

Ni decidu esti humilaj.

Ni povas decidi humiligi nin mem per konkerado de malamikeco al niaj gefratoj, konsiderante ilin kiel nin mem, kaj levante ilin kiel alta aŭ pli alta ol ni estas. (Vidu D&I 38:24, D&I 81:5; D&I 84:106.)

Ni povas decidi humiligi nin mem per ricevado de konsilo kaj puno. (Vidu Jakob 4:10; Hel. 15:3; D&I 63:55; D&I 101:4-5; D&I 108:1; D&I 124:61, 84; D&I 136:31; Prov. 9:8.)

Ni povas decidi humiligi nin mem per pardonante tiujn kiuj nin ofendis. (Vidu 3 Ne. 13:11, 14; D&I 64:10.)

Ni povas decidi humiligi nin mem per farado de sindona servo. (Vidu Mosiah 2:16-17.)

Ni povas decidi humiligi nin mem per irante je misioj kaj predikante la vorton kio povas humiligi aliajn. (Vidu Alma 4:19; Alma 31:5; Alma 48:20.)

Ni povas decidi humiligi nin mem per alvenante al la templo pli ofte.

Ni povas decidi humiligi nin mem per konfesado kaj forlasado de niaj pekoj kaj naskiĝante de Dio. (Vidu D&I 58:43; Mosiah 27:25-26; Alma 5:7-14, 49.)

Ni povas decidi humiligi nin mem per amante Dion, submetante nian volon sub Lia, kaj metante Lin unue en niaj vivoj. (Vidu 3 Ne. 11:11, 3 Ne. 13:33; Moro. 10:32.)

Ni decidu esti humilaj. Ni povas fari ĝin. Mi scias, ke ni povas.

Miaj karaj fratoj kaj fratinoj, ni devas prepari por elaĉeti Sionon. Ĝi estis esence la peko de fiero, kio preventis nin por establi Sionon, en la tempo de la profeto Jozefo Smith. Ĝi estis la sama peko de fiero, kio finis konsekradon inter la Nifaiidoj. (Vidu 4 Ne. 1:24-25.)

Fiero estas la granda faligilo de Siono. Mi ripetas: Fiero estas la granda faligilo de Siono.

Ni devas purigi la internan vazon per la konkerado de fiero. (Vidu Alma 6:2-4; Matt. 23:25-26.)

Ni devas cedi "al la instigaĵoj de la Sankta Spirito", demeti la fieran "naturan homon", fariĝi "sanktulo per la pekliberigo de Kristo, la Sinjoro," kaj fariĝi "kiel infano, obeema, milda, humila." (Mosiah 3:19; vidu ankaŭ Alma 13:28.)

Ke ni povas fari tion kaj daŭrigi antaŭen por plenumi nian dian destinton estas mia fervora preĝo en la nomo de Jesuo Kristo, Ameno.

(Tradukita en Esperanton de Scott Turton.)